# AGADRAPORTO DE ESPERANTO-FRANCE (UFE)

(Periodo de la 1-a de oktobro 2002 ĝis la 30-a de septembro 2003)

## 1. Administrado

### 1.1. La estraro (raportas *Claude Longue-Epée*)

La estraro, elektita en Strasburgo en 2002, estis renovigita per baloto far la komitato je la 1-a de junio 2003.
Post demisio de Olivier Moreau, antaŭa ĝenerala sekretario, kaj komitataniĝo de François Bartsch, estis balotelektitaj: C. Longue-Epée, prezidanto respondecanta pri eksteraj rilatoj; C. Nourmont, vicprezidanto pri kulturo; B. Flochon, vicprezidanto pri informado; J. Mathieu, ĝenerala sekretario; J-L. Texier, kasisto; X. Godivier, vicsekretario pri regionaj kaj lokaj asocioj; F. Bartsch, vicsekretario pri informado.

La estraro kunvenis 5 fojojn en Parizo, kaj plurfoje en Grésillon okaze de la jarkongreso. Inter tiuj fizikaj kunsidoj la estraranoj ĉiutage interrilatis per reto, interalie por pritrakti urĝajn aferojn. Plurfoje estis invititaj diversaj komisiitoj pri specifaj temoj, por prezenti siajn agadojn, inter aliaj: Renée Triolle pri instruado kaj ekzamenado; Albert Sanson pri juraj aferoj; Ludivine Delnatte pri kontaktado kun Universitatoj.

### 1.2. La komitato (raportas *Claude Longue-Epée*)

La konsisto de la komitato, je la 30-a de septembro, fino de la kontjaro, estas jena:
Elektitaj de la individuaj membroj (inter kiuj tri novaj membroj): M. Abada-Simon; F. Bartsch; P. Berizzi; P. Chavignon; B. Flochon; C. Gallego; K. Garino; X. Godivier; C. Longue-Epée; J. Mathieu; O. Moreau; C. Nourmont; C. Pinard; A. Piolat; J-L. Texier; L. Vignaud.
Komisiitaj de la regionaj asocioj kontraktintaj kun UFE: J-M. Cash (Sud-Pireneoj); J. Ducloyer (Bretonio); M. Fontaine (Rodanalpo); A. Grossmann (Oriento); J. Hénin (Langvedoko-Rusijono); J. Lazert (Francilio); E. Papciak (Aŭvernjo); E. Plutniak (Nordo); R. Triolle (Provenco).
Komisiitaj de la fakaj kaj specifaj asocioj: J. Catil (GEE); A-M. Chaney (FKEA); V. Charlot (FET); X. Dewidehem (JEFO).

La komitato kunvenis du fojojn en la Pariza sidejo, en februaro kaj septembro 2003, kaj du fojojn en Gresillon fine de majo-komence de junio 2003.
Laŭstatute aŭ speciale komisiite, la komitato proponis kaj adoptigis diversajn rezoluciojn, interalie pri:
- Krom, en septembro 2002: - la adopto de nova kalendaro por eldono, voĉdono kaj aprobo de agadraportoj, financraportoj kaj budĝetoj; - la principo de neinterveno per prezento de kandidatlisto sur la politikan terenon okaze de la Eŭropparlamenta baloto de 2004.
- Kontaktado daŭra kun regionaj kaj lokaj asocioj, per definitivaj kontraktoj kaj interŝanĝoj de specifaj komisiitoj, aparte por komuna interkonsentita varbado.
- Lanĉo de speciala dissendolisto "UFE-membroj", por senpera interŝanĝo de informoj kaj opinioj.
- Reklamaj, monpetaj kaj varbaj kampanjoj al la ekstera publiko pere de la revuo LME, de folioj pri "Defendo de la Lingva Diverseco", de "subtenantaj kartoj"; ankaŭ pere de reklamanonco en la ĵurnalo "Le Monde" dank"al la donacoj de japana mecenato.
- Kampanjo, kunlabore kun FEI, interasocia komisiono kun SAT-amikaro, lokaj kaj regionaj asocioj, por pliampleksigi la Esperanto-kursojn kaj la Esperanto-ekzamensesiojn.
- Helpo - homa kaj mona - al FET, por preparo, organizo, partopreno por la Eŭropa Socia Forumo.
- Kampanjo tutlanda kaj ĉiuregiona al la politikaj partioj kaj kandidatlistoj, kadre de la Eŭropparlamenta baloto de 2004.
- Preparo kaj organizo de speciala parado en Strasburgo la 9-an de majo 2004, por defendo de la lingva diverseco, kun EEU kaj asocioj defendantaj la naciajn lingvojn.
- Rilatado konstanta de UFE kun EEU cele al komunaj agadoj; kaj kampanjo al UFE-membroj por mona subteno al la "Brusela Komunikad-Centro" de EEU.

### 1.3 Sidejo (raportas *Jerôme Mathieu*)

*Reklamo ĉe la strato*
Nun aperas malantaŭ la frontvitroj de la sidejo tri grandaj paneloj kun la logobildo « Espéranto-France », kolora, bone videbla el la strato.

*Funkciado de la asocio*
La volontuloj Louise Marin kaj Materne Schmidt le Roi daŭre funkciigis la administradon de la asocio, dum la tuta jaro senĉese. Materne Schmidt le Roi zorgis pli specife pri la libroservo, kaj Louise Marin pri la aliĝiloj al la asocio kaj la kongresoj, kaj pri la abonoj diversaj.

La kasisto, laborante surloke, ofte kunhelpis al la decidoj necesaj pri la ĉiutagaj problemoj stariĝantaj.

Ili estis ofte helpataj de pliaj volontuloj, ĉu por la sendado de la bulteno, la revuo, aŭ iuj leteroj, ĉu por tajpi dokumentojn, prepari la libroservo-sendaĵojn, aŭ ordigi la multajn dokumentojn konservindaj ĉe la sidejo.

La materialo informadika de la sidejo estis plejgrandaparte renovigita en decembro 2002. Tio ebligos la renoviĝon de la programo por mastrumi la aliĝojn, kaj eble ankaŭ la libroservon. Tamen la programon ni ne suksesis finpretigi dum la jaro, kiel antaŭplanita.

*Akceptado*
Junuldungitino Ludivine Delnatte helpis al la akceptado de vizitantoj ĉe la sidejo. Ŝia dungo ebligis malfermi la sidejon laŭ pli longa horaro, entute 54 horoj ĉiusemajne.

Ludivine Delnatte plej taŭge akceptis la vizitantojn kaj telefonalvokantojn, kaj laŭ la bezono konsilis ilin pri la libroj aŭ informis pri esperanto kaj la servoj de la asocio. Ŝi ankaŭ zorgis pri ĉiuj mesaĝoj ricevitaj ĉe info@esperanto-france.org, kaj plej ofte pri la respondoj.

Tiel ŝi certe kontribuis al la kreskado de la libroservo-vendoj, kaj ankaŭ al la kreskado de nia membraro. En februaro kaj marto, Ludivine Delnatte ankaŭ relanĉis al pli ol cent aliĝintoj por la jaro 2001-2002, kiuj ne estis kotizintaj por la jaro 2002-2003; tio ebligis konservi pli ol 40 el ili.

Ŝi vizitis kelkajn universitatojn, kie ŝi, kun la helpo de JEFO, informis la studentojn pri esperanto.

Ludivine Delnatte anoncis en aprilo sian demision por septembro 2003. Ni sensuksese serĉis volontulon ene de la esperantista junularo por daŭrigi la postenon kaj agadi pli aktive al la ekstera publiko.

**1.4. La kongreso** (raportas *Claude Longue-Epée*)

La interasocia kongreso okazis en Baugé, gastigate de la Kulturdomo en la kastelo de Grésillon, de la 28-a de majo ĝis la 1-a de junio 2003. ĝi kunvenigis centon da partoprenantoj, inter kiuj estis 53 aktivaj membroj debatantaj dum la ĝenerala membrokunveno de la 31-a de majo.
La gekongresanoj povis loĝi surloke en la renovigitaj ĉambroj de la kastelo, kaj ankaŭ havi en la du manĝoĉambroj komunajn manĝojn preparitajn en la renoviĝanta kuirejo. Ili povis konstati la gravajn laborojn faritajn por aranĝi kaj perfektigi la domajn strukturojn. Ili ĉefe ĝuis la agrablaĵojn de la parko kaj de la ĉirkaŭaĵoj, vizitante interalie la kastelon de Baugé kaj la urbon Angers, akceptate en la urbdomo de Baugé kaj tie regalate per honorvino. Ili povis ĉeesti prelegojn pri la abelbredado, pri la vojaĝo de David kaj Rachel, kaj pri la preparo de la Eŭropa Socia Forumo. Ili interesate spektis filmon pri la historio de la Kulturdomo kaj kanzonan spektaklon de Jo Mo.
Ĉi-jare, krom en la kunvenoj organizitaj, ĉu de la komisionoj pri eksteraj rilatoj kaj pri strukturado, ĉu de la asocioj GEE kaj Esperanto-Jeunes, ĉiuj gekongresanoj povis partopreni en tre aktivaj debatgrupoj pri la vivo de lokaj kaj regionaj organizaĵoj, pri trejnado al asocia animado, kaj pri esperanto-instruado kaj ekzamenado.
Dum la ĝenerala membro-kunveno estis adoptitaj: - plialtigo de la kotizoj surbaze de ekvilibrota budĝeto; - tekstoskemoj de regionaj statutoj kaj de interasociaj kontraktoj; - tekstoj de "Deklaro" kaj de "ĉarto" prezentotaj al la politikistoj por promocio kaj eksperimentoj de esperanto en la Eŭropuniaj instancoj kaj en la naciaj sistemoj de instruado.

**1.5 Seminario kaj trejnado de la aktivuloj** (raportas *Jérôme Mathieu*)

*Kursoj kaj staĝoj pri esperanto ĉe la sidejo*
La estraro difinis novan akordon kun la regiona asocio Esperanto-Ile-de-France en junio pri la organizado de kursoj kaj staĝoj ĉe la sidejo. Laŭ la akordo, valida ekde septembro 2003, la regiona asocio ĝuas pli grandan aŭtonomion por decidi pri la prezoj kaj allogi pli da homoj. La respondecoj de Espéranto-Ile-de-France estas precize difinitaj kaj enlarĝigitaj. Tamen, Espéranto-France daŭre finance kontribuos al la varbado por tiuj kursoj kaj staĝoj, celantaj ne nur francilianoj sed ankaŭ la aliajn francajn regionojn.

*Kolokvoj kaj seminarioj*
En februaro okazigis Espéranto-France interasocian seminarion pri varbado al la junuloj kaj aktivigado de nacia asocio. Tiun seminarion ni organizis dank' al subvencio, kaj kun la helpo de du aliaj asocioj junularaj neesperantistaj. Partoprenis al la seminario pli ol 20 aktivuloj esperantistaj. Estis oportuno por interkonatiĝi kun neesperantistaj agadmanieroj, lerni pri iliaj spertoj, kaj ankaŭ diskonigi Esperanton al ili.

La konkludoj de tia seminario temas pri:
- unue la taŭgaj manieroj por organizi kursojn en kolegioj, aŭ ĝenerale por prezenti ideojn al la junulara publiko,
- due la malfacilaĵoj devenantaj de la strukturado mem de nia movado en Francio,
- kaj trie pri la neceso, ke nia asocio trejnu siajn aktivulojn laŭ diversaj temoj, inter aliaj informado, varbado, rilatoj kun diversaj instancoj, kontado, ktp.

**1.6 Rilatoj kun UEA** (Universala Esperanto Asocio) (raportas *Claude Nourmont*)

Espéranto-France estas reprezentita de Claude Nourmont kaj Renée Triolle ĉe la komitato de UEA. Ambaŭ aktive partoprenis la kunsidojn de la komitato dum la UK en Gotenburgo. Nun la komunikado inter la du asocioj fariĝas grandparte pere de la reto. Membroj de la komitato de Espéranto-France rete ligitaj estas abonigitaj al la gazetaraj komunikoj de UEA. Krome se venas gravaj informoj pere de aliaj dissendolistoj de UEA C. Nourmont tuj plusendas ilin rete ĉu al la estraranoj, ĉu al la komitato, ĉu al la membroj.

**1.7. Rilatoj kun "Espéranto-Jeunes"** (raportas *Claude Longue-Epée*)

Daŭris dum la tuta jaro aktiva interfluo de informoj, kiu faciligis kaj glatigis la rilatojn inter la du asocioj. Xavier Dewidehem estis la reprezentanto de Espéranto-Jeunes en la UFE-komitato. Li mem aŭ Bertrand Hugon kaj Ludivine Delnatte, ambaŭ kiel prezidantoj de Espéranto-Jeunes, akompanis kaj helpis Claude Longue-Epée kaj Jérôme Mathieu en diversaj rendevuoj, kun politikaj partioj kiel PRG, aŭ kun la oficestroj de la ministerio pri edukado kaj junularo.

**1.8. Rilatoj kun GEE** (raportas *Claude Longue-Epée*)

La prezidanto de GEE, Jo Catil, kaj liaj kolegoj Gaston Riste kaj Marie-France Condé Rey estas en regula kontakto kun Espéranto-France, kaj aktive partoprenas en la kunvenoj de la komitato.

## 2. La komisionoj

**2.1. Komisiono pri Eksteraj Rilatoj** (KER) (raportas *Claude Longue-Epée*)

*Rilatoj kun la edukaj kaj instruaj medioj*

Post la aktiva kampanjo de la pasinta jaro, sekvanta la deputitan balotadon de la printempo de 2002, farata de Espéranto-France al la ministro kaj ministrodelegitoj pri edukado kaj instruado, daŭrigata per diversaj intervenoj en la Nacia Asembleo de deputitoj instige de la regionaj Esperanto-asocioj, sekvis en novembro 2002 oficiala rifuzo de la ministerio agnoski esperanton kiel laŭvola programero de instruado kaj de ekzamenado "pro senkultureco kaj senhistorieco de Esperanto". De tiam KER relanĉis plurfoje siajn alvokojn al la ministrodelegito pri instruado, kaj eĉ unufoje al la respublika prezidento....sensukcese.

*Rilatoj kun asocioj defendantaj la francan lingvon*

KER konservas konstantajn rilatojn, pere de Raymond Besson de "Le Droit De Comprendre" kaj de CLEC, kun tiuj asocioj (ĉiuj pli malpli interfederaciiĝintaj). Pli kaj pli tiuj asocioj forgesas siaj timojn kontraŭ esperanto, kaj ili emas alproksimiĝi kaj kunlabori kun la esperantista movado. Tiu kunlaboremo troviĝas en la preparoj de la prilingva parado de la 9-a de majo 2004 aŭ de la Bulonja renkontiĝo de 2005.

Sur la sama tereno, kun la helpo de la Brusela Komunikad-Centro de EEU, KER kampanjis al dudeko da naciaj deputitoj, kiuj intervenis en la Nacia Asembleo kontraŭ lingva diskriminacio favora al la angla kaj farita de oficialaj, ŝtataj aŭ Eŭropuniaj oficejoj.

*Rilatoj kun la politikaj partioj kadre de la Eŭropa baloto de 2004*

Surbaze de la tekstoj aprobitaj en Grezijono aŭ en Gotenburgo "Deklaro de Espéranto-France", "ĉarto pri lingva diverseco", "Rezolucio de Gotenburgo", KER sendis leterojn, petante rendevuojn, al la francaj politikaj staboj, kaj al la Eŭropdeputitoj. Tiu kampanjo daŭras. ĝi reaktiviĝos antaŭ la baloto de 2004, per agado de niaj regionaj organizaĵoj al siaj regionaj kandidatlistoj, kaj per agado de niaj membroj al siaj konataj politikistoj kaj balotelektitoj.

Claude Longue-Epée reprezentas Espéranto-France en la komitato de EEU kaj ofte intervenas por instigi la Eŭropajn Esperanto-asociojn al komunaj agadoj kun UFE (Eŭropbalota kampanjo, Eŭropa Socia Forumo, Eŭropa prilingva parado de majo 2004).

Philippe Chavignon kaj Claude Longue-Epée regule renkontas SAT-amikaranojn, kun interalie FET, GEE, JEFO, FEI pri tiuj samaj Eŭropecaj temoj, pri instruado kaj ekzamenado, pri starigo de komunaj projektoj.

**2.2. Komuna Komisiono pri Strukturado**

Dum la interasocia kongreso de Grésillon estis proponitaj da la komisiono, kaj adoptitaj de la ĝenerala membrokunveno, du tekstoj. Ili kompletigas la laboron faritan kadre de la nova statuto de 2000 por pliintensigi kaj pliefikigi la kunlaboradon inter la landa kaj la regionaj asocioj:
Unue, ŝablono de statuto de regiona asocio, kiel eble plej sekvenda de la asocioj;
Due, modelo de kontrakto subskribenda de la regionaj asocioj kun Espéranto-France.

Albert Sanson, responsulo de la komisiono, estas studinta kaj preparinta tiujn tekstojn, kaj tiel bonege finis laboron komencitan antaŭ pluraj jaroj. Li lasas la komisionon inter la manoj de Xavier Dewidehem.

Aliflanke estis decidite, ke:
Ekde la 1-a de oktobro 2003 la nekontraktintaj federacioj laŭstatute ne plu ricevos de Espéranto-France parton de la kotizoj de la UFE-membroj de sia regiono.
Kaj la ĝis tiam provizore subskribitaj kontraktoj restos validaj preter la dato je la 31-a de decembro 2003.

Je la 30-a de septembro 2003:
- 2 federacioj subskribis definitivan kontraktojn: Aŭvernjo, Bretonio.
- 7 regionaj federacioj daŭre kunlaboras surbaze de provizora akordo: Landvedoko-Rusijono, Nord-Pas-de-Calais-Pikardio, Oriento, Francilio, Provenco, Rodanalpo, Sud-Pireneoj.
- 2 federacioj estas kontaktantaj kun UFE cele al subskribo de akordo: Poitou-Charentes, Centr-Okcidento.
- 4 federacioj ne reagis ĝis nun: Burgonjo, Centro, Normandio, Sudokcidento.
- 4 fakaj kaj specifaj asocioj subskribis definitivajn kontraktojn: GEE, JEFO, FET, FKEA.

**2.3 Komisiono pri Informado** (raportas *Bruno Flochon*)

Expolangues: komuna budo JEFO-UFE estis denove ĉe la foiro de la lingvoj. Sed pluraj eraroj instigas nin repripensi entute la organizadon de la budo kaj de la deĵorado por venontjara ĉeesto, en Expolangues 2004.
La serio de la 5 paneloj por ekspozicii pri Esperanto en la liceoj kaj universitatoj bone disvendiĝas inter la kluboj de Francio, ĉiam kun loka kontakto aldonita. Ni atingas ĉirkaŭ 20 serioj de paneloj jam uzataj en diversaj lokoj de Francio. Eldono de nova versio aktualigita de la katologo pri informmaterialo.
La redaktoro de LME fine ĉesis sian kunlaboradon kaj pri la redaktado zorgas ekde nun Claude Nourmont kaj pri la enpaĝigado Bruno Flochon, atendante kandidatojn por helpi.
Ni daŭris nian laboron ĉe la amaskomunikiloj, sed bedaŭras la manko de tempo por pliprofesiigi ĝin kaj pli larĝe kaj pli ofte dissendi gazetarajn komunikojn.
Aperis nova anonco unu paĝo en Le Monde, dank'al iu japana mecenato kiu lanĉis kaj financis gazetaran kampanjon por Esperanto en Europo. La preparado de la anonco estis longa kaj malfacila kaj postulis 5 monatojn da laboro. Sed finfine la anonco aperis la 14-an de junio. Post diskuto inter komitatanoj estis decidita eldoni libreton por bonvenigi ĉiujn membrojn de la asocio. Ĝi entenos plej komplete ĉiujn bazajn informojn. Armelle Piolat eklaboris pri ĝi kaj grupo kunvenis por daŭrigi la laboron, sed eldono ankoraŭ ne pretas.

**2.4 Revuoj**

**2.4.1 Le Monde de l'Espéranto** (*raportas Claude Nourmont*)
Le Monde de l'Espéranto aperas ĉiun duan monaton. Ĝis la 30-a de aprilo 2003 ĝin redaktis Christian Lavarenne, enkadre de laborkontrakto. Ekde n°540 (majo-junio) transprenis la redaktadon Claude Nourmont, la grafikan laboron prizorgas Bruno Flochon. Kunlaboras pluraj homoj, i.a. Claude Longue-Epée, J. Mathieu (informoj pri la agado), L. Delnatte(junulara paĝo), S. Sire (bildstrio), F. Bartsch (kiu relegas). La aperado malfruiĝis en la komenco de la jaro, tamen nun la revuo preskaŭ reakuratiĝis.

**2.4.2 Okazas** (raportas *Jean-Louis Texier*)

11 numeroj estis senditaj dum la jaro 2002-2003, intereso plu montriĝas en la bona provizo de regula informado, pligrandiĝis la nombro da informantoj. Telefono restas la konstanta plej ofta ligilo.

**2.5 VEKO** (raportas *Jean-Louis Texier*)

Kampanjoj de readmono : La speciala numero de LME sendita en la antaŭa jaro estis alportinta novajn abonojn, kaj novajn kotizojn. Ve, la duono estis perdita en la sekvanta jarperiodo, eble pro ne bona konsidero al tiuj eksmembroj kaj eksamikoj. Tamen tiu gravega afero estis kompensita de alifontaj novaj kotizantoj sed analizo estis farita de VEKO-respondeculo kaj donita por ekspluato al la estraro kaj komitato. La kampanjo « *Défense des Droits Linguistiques* » lamis pro materiaj problemoj, sed ties realiga neuzita buĝeto estis portita al la nova jaro. Plu kompilis VEKO la informojn de kursaj kaj grupaj strukturoj por helpi al pli profunda konatiĝo kun niaj lokaj respondeculoj.

## 3. Regionaj Asocioj

**3.1 Burgonja Federacio**
Klopodoj estas faritaj flanke de UFE por reviligli la federacion. Okazos kunveno tiucele en Gray komence de aprilo 2004.

**3.2 Centro Okcidenta** (raportas *Laurent Vignaud*)

En la departementoj de la Centr-Okcidenta federacio, en 2003 okazis la kutimaj diversaj agadoj, i.a. kursoj kaj staĝoj (Le Mans, Tours, Angers, La Roche-sur-Yon, Bouresse, Grésillon, Loir-et-Cher, Loire-Atlantique,...). La federacian bultenon sendas la sekretario tri-foje jare. Krom tio, eblas mencii partoprenon de lokaj E-grupoj en diversaj aranĝoj: lingvaj festivaloj en Tours kaj Nantes, "Forumo de asocioj" en Vendeo, "La 24 horoj de la Libro" en Le Mans. Pluraj grupoj ricevis vizitojn de eksterlandanoj. Alian gravan federacian rendevuon konsistigis la jara kongreso en Tours, la 15-an de junio 2003.
Dum 2003 ankaŭ plu daŭris la renovigaj laboroj en Grésillon, kun organizado de pluraj laboraj semajnfinoj. En ili partoprenis de 10 ĝis 35 homoj. Dank' al ili povis okazi internacia familia renkontiĝo (komence de julio) kaj someraj staĝoj. En 2004, dank'al tiuj laboroj, kaj ĉefe dank' al la laborintoj! eĉ estos pliaj ĉambroj uzeblaj. Notindas, ke tiuj semajnfinoj plu okazos en 2004: estas bonvenaj ĉiuj bonvolemuloj!

**3.3 Esperanto Aŭvernio** (raportas *Eugène Papciak*)

Federacia membraro: La federacia membraro estas kvazaŭ senŝanĝa: 65 membroj, dispartigitaj en 4 departamentoj: Puy-de-Dôme (46), Allier (15), Haute Loire (3) kaj Cantal (1). Esperanto kluboj agadas en Clermont-Ferrand, Moulins kaj Vichy-Bellerive. La ĝisnuna varbado de kelkaj novaj membroj nur kompensas la malaperon de tre maljunaj esperantistoj. Ni esperas ke nova agmetodo konsistanta je komunaj agoj kun aliaj asocioj kontribuos al pli efika varbado.

Federacia agado: Federacio estigis daŭrajn kontaktojn kun: Université Populaire et Citoyenne (Popola kaj Civitana Universitato) de Clermont-

Ferrand, kiu organizos esperanto-kurson en la jaro 2003-2004. UNESCO – klubo de Aŭvernio kun kiu estis organizita komuna ekspozicio en Mont-Dore (Puy-de-Dôme) de la 4a ĝis la 8a de junio 2003. Organizantoj de la Departamenta Socia Forumo.

Krome, la federacio iniciatis jenajn agojn: Aŭtoralion kun asocio « Cournon sans frontières » kaj tri lernantinoj (Superaj Teknikistinoj pri Komerca Agado), kiu okazis en aprilo 2003. Du prelegojn de G. Kersaudy, en Cournon d'Auvergne kaj en la FNAC de Clermont-Ferrand, kaj intervjuon en Radio France Bleue d'Auvergne. Akcepton de 14 la 7an de septembro, kaj viziton de *Vulkania* kiun partoprenis ankaŭ 11 francaj esperantistoj. Intervjuon en loka radio (*Radio Altitude*) kun esperantaj kantoj (entute unu hora radio elsendo okazinta la 25an de novembro 2002). Ekspozicion okaze de Socia Forumo en Brassac-les-Mines (Puy-de-Dôme) de la 1-a ĝis la 4a de majo 2003. Ekspozicion okaze de Forumo de Asocioj en Cournon d'Auvergne (9a kaj 10a de novembro 2002). Ĝeneralan Asembleon kaj Zamenhofan Feston la 14an de decembro 2002.

Agado de lokaj grupoj: En Clermont-Ferrand (63), ĉiu-monataj kunvenoj, dum kiuj prelegas unu klubano, ekspozicio okaze de Forumo de Asocioj (5a kaj 6a de oktobro 2002) en Clermont-Ferrand, prelego pri esperanto en loka asocio en Ambert (18–03-2003). En Moulins (03): dutaga staĝo (19a kaj 26a de januaro 2003), renkontiĝo kun ornitologoj, vizito de birda protektejo kaj « surstrata » komuna manĝo (14–09-2003). En Vichy-Bellerive (03): Esperanto – ekspozicio en biblioteko de Bellerive (12a ĝis 23a de novembro 2002), prelego pri esperanto en Bellerive (23-11-2002)

Kursoj: Esperanto kursoj funkciis en Clermont-Ferrand (por komencantoj – 6 lernantoj, konversacia rondo –5 personoj), en Moulins (8 komencantoj) kaj en Vichy-Bellerive (3 komencantoj). Neniu ekzameno okazis dum pasintaj jaroj. Pro tio, la federacio intencas organizi ekzamenojn en 2004.

Rilatoj kun gazetaro: en regiona ĵurnalo « La Montagne » aperadis regule anoncoj pri esperanto kunvenoj kaj eventoj. Kluboj aperigis plurajn artikolojn (ofte kun fotoj eĉ koloraj) pri esperantaj okazintaĵoj (agoj de lokaj kluboj, vizito de eksterlandanoj, universala kongreso…).

**3.4 Langvedoka Rusiljona Federacio** (raportas *Jean Hénin*)

Grupoj funkcias en Béziers, Montpellier, Perpignan, Prades, kun monataj kunvenoj, Zamenhof-tago kaj partopreno en la forumoj de asocioj por la du unuaj, kaj kursoj. Tutsemajnaj staĝoj disvolviĝas en Vias-Agde je Ĉielirado kaj Sète fine de aŭgusto. La federacianoj pli ofte vizitas la aranĝojn de la najbaraj federacioj. La federacia bulteno, "Sudfrancia Stelo", aperas ĉiutrimestre.

La grupo de Béziers akceptis Mikaelon Bronjstein kaj G. Kersaudy prelegis en du lokoj, okaze de la Sat-Amikara kongreso en Cap d'Agde, por kiu ni kunlaboris. La regiona konsilantaro atribuis subvencion por la organizado de tiu kongreso, por kiu aperis nova broŝuro en Esperanto pri la regiono de Béziers.

Nova komitatano de France-Esperanto venas de nia regiono kaj ni subskribis kontrakton kun Espéranto-France. La federacio kunvenis en aŭtuno en Béziers kaj printempe en Lodève, kun ekspozicio pri esperanto. Pri la diversaj eventoj menciataj aperis raportoj en la gazetaro. Ankaŭ pri la renkonto proksime de Prades inter Katalunoj de ambaŭ flankoj de la limo, kiu rezultigis la decidon de Kataluna kaj Transpirenea kongreso en Céret fine de oktobro 2004 kaj pri la turisma semajno en Lozère lastan septembron kun partopreno de Flandraj esperantistoj de Belgio kaj Nederlando.

Ni eldonis novan koloran faldfolion en 500 ekzempleroj kaj realigis novajn banderolojn. Kampanjo ĉe la deputitoj: du trionoj respondis, pluraj faris skriban demandon al la Ministerio pri Edukado. Kuraĝiga estas la provo de du geinstruistoj en Lunel lanĉi esperanto-klubon en kolegio. Bedaŭrinda estas la fakto, ke el niaj 5 departementoj, ne estas vivosigno pri Gard.

En 2004 la pliampleksiĝo de la Eŭropa Unio kaj la eŭropa baloto estos grava momento por ni ĉiuj. Espereble ni kapablos aŭdigi nian voĉon. Laste menciindas ankaŭ en nia regiono, nedependante de la federacio, "Esperanto Info", kiu eldonas revuon en la franca pri esperanto kaj "Réinsertion et Espéranto", kiu daŭre instruas Esperanton en lernejoj kaj informas pri la internacia lingvo.

**3.5. Asocio Espéranto-Nord** (por la jaro 2003) (raportas *Claude Longue-Epée*)

La Norda federacio, je la 30-a de septembro, havas 101 membrojn.
Tio montras perdon de 4 membroj, sed kun konservo de la membroj aligitaj dum la antaŭa jaro pere de la kampanjo al nefederaciaj UFE-membroj. Espereble UFE konservis la novajn membrojn aliĝintajn dank'al la samepoke farita kampanjo al ne-UFE-aj nordfederacianoj.
Tiu membraro daŭre malegale dispartiĝas inter la du-departementa regiono Nord-Pas-de-Calais (pli ol 85%) kaj la 5 departementoj de Picardie (malpli ol 15%).

En NF estis gvidata dekon da aktivaj kursoj, kun pli ol cent kursanoj komence de la lernojaro, kiuj malpliiĝis al 50 je ĝia fino. 20% estas junuloj, lernejanoj, kolegianoj, studentoj.

En Lille kaj ties universitato de Villeneuve-d'Ascq estis organizitaj prelegoj, jaraj kursoj, inicaj diversepokaj kelktagaj staĝoj.
Estis organizitaj du tuttagaj specialaj ekzamensesioj, kun akiro de 1 diplomo pri kapableco (komuna trunko), 5 diplomoj pri elementa lernado kaj 10 duoblaj diplomoj pri elementa kaj supera lernado.

La grupoj de la NF serĉas kontaktojn kun la neesperantistaj medioj. Partoprenoj en "Forumoj de asocioj". Prelegoj en lernejoj, mediotekoj, Rotary, Lyon's, Liberpensuloj. Artikoloj en lokaj gazetoj.

En NF viglas interŝanĝoj, renkontiĝoj kaj vojaĝoj inter kluboj, kun Ostendo, Kortrejko, Gento, Solre-sur-Sambre, Charleroi (B), Ipswick (GB), Krefeld (G). Federacianoj vizitis Bouresse kaj Grésillon. Kiel ĉiujare okazos en Novembro la staĝo de Morbecque kun kvinnivelaj kursoj kaj alloga kulturprogramo.

La NF aperigas revuon "Norda Gazeto" por ĉiuj siaj membroj, kaj 4 grupajn revuetojn.
Okaze da la jara kongreso en Esquelbecq estis, je la unua fojo, organizitaj pluraj malampleksaj studgrupoj pridiskutantaj la aktualajn temojn "problemo de la perdiĝantaj departementoj" kaj "nuntempa malpliiĝo kaj maljuniĝo de nia membraro", kiuj forte interesis la partoprenantojn.

La NF estonte planas: - daŭrigi saman politikon pri kursoj kaj ekzamenoj; - daŭrigi kaj fortigi samajn kampanjojn lige kun UFE; - konservi tre intimajn rilatojn kun UFE; - agadi laŭ UFE-kampanjoj al lokaj politikistoj kaj balotelektitoj kadre de la balotoj de 2004; - subskribi novan definitivan kontrakton kun UFE, post ŝanĝo de la nuna statuto kaj de la geografiaj limoj de la federacio, konservante nur la departementojn de Nord-Pas-de-Calais kaj Picardie, helpante Ardennes kaj Marne, por konsistigi novan federacion "Champagne-Ardennes"; - daŭrigi la aktivan preparadon de la "Amikeca Renkontiĝo de Boulogne-2005" kun UFE kaj ties fakaj asocioj, kaj kun SAT-amikaro, la Belgaj kaj Brita Esperanto-asocioj.

**3.6 Espéranto-Normandie**
Ne alvenis raporto.

**3.7 Espéranto-France-Est** (raportas *Armand Hubert*)

*Kunvenoj kaj okazaĵoj*
Finsemajna staĝo en Nancy: 18-20/10/02. Invito de la kongresanoj en la urbodomo de Nancy. Vicurbestrino pri komunikado paroladis pri la taŭgeco de internacia interkompreniĝo.
Finsemajna staĝo en Hennezel (88), 10–13/ 04/ 03: kursoj, seminarioj, inicado al naturprotekto.
Forumado en Fontenoy-la Joute (88), libro-vilaĝo. Surtrotuara stando dum monatfinaj dimanĉoj de junio ĝis septembro.
Centre mondial de la paix, en Verdun. sept – oct 2003. Exposition « l'Espéranto, une langue, un choix humaniste ».
*Servoj*
Revuoj: La Informilo, federacia revuo: aperas kvarfoje po jaro. La Domo, eldonita de TAKE (Wintzenheim / 68): fakaj kontaktoj eksterlandaj. Sudrejna Bulteno, komuna revuo inter Mulhouse kaj Bazelo (Svisio).
PKK: 10 novaj aliĝantoj + 3 malnovaj.
Enketo en la 10 kluboj de EFEst pri ilia agado. Notinda kurso de Esperanto en mezlernejo de Epinal (88) kaj en Saulxures (88).
Reta hejmpaĝo de EFEst.
Libroservo: La bretaro nuntempe nombras 556 titolojn por 2774 libroj.
Monhelpo de EFEst: Monsubteno al programo EDUKO de UEA (500 €), al infankunveno en Grésillon, donaco de 76 €. al malagasa revuo "Inter Ni".

**3.8 Francilio (**raportas *Jean Lazert, kun revizio de Albert Sanson kaj Philippe Bérizzi*)

*JARO 2002*
En Novembro, la redaktado de la bulteno "Flash Espéranto Île-de-France" estis transdonita de Hugues Henry al Jean Lazert. En Decembro, la Federacio ĉeestis la Zamenhofan feston de U.F.E., kies temo estis "Saŭrkraŭto", en restoracio apud "Gare de Lyon".

*JARO 2003*
En Januaro okazis " Expolangues ". Espéranto-France (U.F.E.) provizis budon (pli grandan ol kutime). La gejunuloj de Espéranto-Jeunes (JEFO) prizorgis la aferon kaj esperantistoj de nia federacio helpis ilin.

En Marto, Esperanto Ile-de-France organizis sian membrokunvenon en Évry (91) en la labordomo de la entrepreno "A6-MédiaGuide". Posttagmeze, ni vizitis la urbon Corbeil-Essonnes, ĉefe ĝia urbocentron kaj la katedralon "Saint-Spire".

De pluraj jaroj, ni ŝanĝas lokon por nia membrokunveno por ke ĝi okazu ĉiujare en malsama departemento de Francilio (77 en 1997, 94 en 1998, 75 en 1999, 92 en 2000, 95 en 2001, 91 en 2002, 91 en 2003, 77 en 2004).

En Junio, la Federacio starigis pruntlibraran servon ("biblioteko") en la Sidejo de la Cerisaie, ĉefe per stoko estinta en la kelo; ĝia ĉefa prizorganto, Jean-Louis Poullet, kun helpo de pluraj komitatanoj (Michèle Abada-Simon, Jean Lazert, Jean Cruchon...) starigis liston de la libroj, pretigis ilin por pruntado, kaj deĵoras kelkajn horojn semajne por vivigi la servon.

En Septembro, la Federacio deĵoris en pluraj forumoj de asocioj: Brétigny-sur-Orge (91), Montrouge (92), Paris 4ème, Asnières (92) kaj en pluraj aliaj lokoj.

En Septembro, okazis ŝanĝoj en la organizo de la kursoj kaj staĝoj. Jean-Luc Tortel instruas por la 2a grado ĉefe kun siaj lastjaraj lernantoj ĵaŭde, Michèle Abada-Simon okazigas 2 unuagradajn kursojn vendrede (por entute 18 lernantoj !) kaj Pierre Royer ree instruas je la 3a grado.

En Septembro ankaŭ okazis ŝanĝoj pri la Konversacia Rondo: de nun Axel Rousseau anstataŭas Albert Sanson, kiu prizorgis ĝin dum ses jaroj, kaj ĝi okazos ĉiujn 1an kaj 3an merkredon de la 19a ĝis la 20a 30.

Dum la tuta jaro

- Trimestra kunveno de la komitato de nia Federacio Espéranto Ile-de-France.
- Konversacia rondo ĉe la sidejo (babiladoj, projekcioj…), ĉiujn 2an kaj 4an merkredojn (ankoraŭ ĉijare), dum 9 monatoj (vespere, de Oktobro ĝis Junio).
- Esperanto-kursoj 3 gradaj ĉe la sidejo, lunde, marde, ĵaŭde (vespere, de Oktobro ĝis Junio).
- Lundaj babiladoj por la progresantoj (ĉiun duan lundon);
- Semajnfinaj staĝoj ĉe la sidejo, 1a- kaj 2agradaj.
- Aktivado en strukturo INSULE, trimestre kunvenas respondeculoj de diversaj asocioj.
- Akurata aperigo de bulteno " Flash " Espéranto Ile-de-France. La bulteno informas pri la esperantista movado, en la pariza regiono & en la tuta mondo.
- Helpo ĉe la sidejo: multaj bonvolemuloj de nia federacio laboras ĉe la "Cerisaie" pri diversaj taskoj.

*Rilatoj kun Espéranto-France (UFE)*
Dum la jaro, la komitatanoj de la federacio aktive partoprenis en la vivo de Espéranto-France. Ĉar nia federacio subskribis kontrakton kun Espéranto-France, reprezantanto de Espéranto Ile-de-France estas aŭtomate membro de la komitato de Espéranto-France kaj partoprenas en ĝiaj komitatkunsidoj. Aliaj membroj de nia federacio ankaŭ estas membroj de la komitato de Espéranto-France, kiel elektitaj membroj.

**3.9 Espéranto-Provence**
Ne alvenis raporto.

**3.10 Rodanalpa Federacio** (raportas *Michel Fontaine*)

*Membriĝo*
La per UFE-aj membriĝoj stagnas (105 anstataŭ 101 en 2002), la rektaj membriĝoj kreskas, preskaŭ duobliĝas (117 anstataŭ 70). Entute la asocio enhavas preskaŭ 200 membrojn.
Pri la membriĝo la kontrakto kun Espéranto-France estis respektita je la fino de 2003 kaj komence de 2004 por ke pli da rektaj membroj aliĝu al Espéranto-France.

*Agadoj*
La festivalo-kongreso en Bourg Saint Maurice (Savojo) estis tre bone organizita de la loka alt-tarenteza teamo, el kiuj Christian Garino. Tiu festo restos en ĉiuj memoroj de la 90 ĉeestantoj pro siaj seriozeco kaj ĝojo.
Rodanalpo forte zorgis pri la forto de Esperanto en diversaj lokoj de sia regiono, sed ankaŭ pri la malkresko en aliaj. Ĝi plifortigis ligojn kun JEFO kaj plijunigis sian administran konsilion. Ĝi plu zorgis pli altan nivelon de Esperanto en lernado kaj pedagogio, pere de sia teamo de "RAK" (Rodanalpaj Kursgvidantoj). Por tio ĝi instigis al ekzameniĝo, kaj aranĝos ekzamenojn dum la 2004a festivalo-kongreso.

*Estonto*
Rodanalpo pretas kontrakti kun Esperanto-France por kunigi niajn fortojn. Ĝiaj statutoj estis diskutitaj kaj ŝanĝitaj tiucele.

**3.11 Sudokcidenta Federacio**
Ne alvenis raporto. La federacio daŭre bezonas volontulojn por revigligi ĝian funkciadon.

**3.12 Espéranto-Midi-Pyrénées** (raportas *Jeanne-Marie Cash*)

*Evoluo de la membraro*
Oni kalkulas 83 membrojn el EKC kaj CEEA, 2 izolitaj membroj kaj dudeko da membroj aliĝintaj kiel individuaj membroj de UFE, do entute proksimume 105.

*Lingvo-kursoj okazis*
- en Haute Garonne (31): Toulouse, (pluraj niveloj), Revel, Labarthe/Lèze.
- en Ariège (09): Verniolle, Ribouisse, kaj Mirepoix; Ekzamenoj okazis la 2an de nov. 2002
- en Hautes Pyrénées (65): Tarbes
- en Tarn (81): Albi kaj Lavaur
- en Aveyron (12): rekomenciĝis kurso en Rodez ekde sept. 2003 (10 lernantoj)

*Standoj en lokaj manifestacioj:*
**31:** Toulouse, Muret, Labarthe/Lèze, plurfoje jare
**09:** Pamiers kaj Verniolle
**12:** Decazeville (forum des langues, 28an de Junio), kaj en aŭgusto en Larzac-manifestacio (je iniciato de F. Bernard)
**12**: Villeneuve: André Andrieu prezentis esperanto-librojn en 3 libro-foiroj

*Publikaj prelegoj:*
**31:** Preleg-debato, en *Maison de quartier* kaj en *MJC.*
S.ro G. KERSAUDY partoprenis debatojn en *Forum des Langues*, antaŭ multnombra publiko ĉefe okcitanistoj. Mikael BRONSTEIN parolis kaj kantis antaŭ ruso-ŝatanta (rusema) publiko.

**09:** *Forum des Langues de Pamiers* la 27 Sept 2003: Jacme TAUPIAC okcitanlingve parolis pri la okcitana linvo kaj pri espéranto.

**12:** La 23-an de Septembro en La Fouillade A. Andrieu prelegis dum 2 horoj antaŭ la membroj de la asocio *Culture Patrimoine*. Estis ĉ. 30 aŭskultantoj, kelkaj tre interesataj, sed ne sufiĉe por tuj lerni.

*Informado en lernejoj:*

**31:** Esperanto estis prezentita al 4 klasoj de privata mezlernejo en Toulouse, dank'al Elodie kaj Pierre-Yves kaj R.CASH

*Amaskomunikiloj: gazetoj / radioj:*

**31:** Naŭ komunikoj estis publikigitaj en La Dépêche du Midi, por anonci niajn agadojn. R. Cash intervjuiĝis de Radio-solidarité, dum tuta horo.ilustrita de diversaj esperantaj muzikoj.

**09:** La gazetoj raportas pri la iniciatoj de esperantistoj.
**12:** La 23an kaj la 30an de Marto, ĉe Radio-Totem en Rodez, André ANDRIEU estis intervjuita dum unu horo ĉiufoje, kadre de okcitana elsendo. Li prezentis E-on proksimume duontempe dum tiuj du horoj, meze de diversaj informoj pri okcitanistaj okazaĵoj. La intervjuantoj mem emfazis la protekton de la kultura diverseco.

**12:**A. Andrieu intervjuiĝis de Le Villefranchois, kiu aperigis la 17an de aprilo favoran artikolon titolitan "La langue de ceux qui espèrent, l'espéranto".

**65: Tarbes**: *La Dépêche du midi* publikigis la 8an de junio bonan intervjuon de Roger Gailhanou, kun foto, kun titolo *Une langue universelle*

*Koncertoj kaj aliaj Kulturaj manifestacioj*

**31:** Koncertoj de Thierry Faverial en dec.(Zam-festo) kaj Mikael Bronŝtein (februaro), kiu kantis kaj deklamis en rusa kaj esperanto. Tuluza Teatra Trupo (TTT) kvarfoje prezentis *La Krimo de strato Lursin'* de Labiche en Bordeaux, Toulouse, Collonge-la-Rouge kaj Cap d'Agde.

**09:** Koruso-semajno fine de oktobro estis reduktita je tri tagoj (do tamen okazis) pro la malmultaj partoprenantoj.

*Vivo de la asocio*

Ĝi vivas pere de la **gazeto** Esperanto-Pyrénées, en kiu du aŭ kvar paĝoj estas rezervitaj al la regiona federacio, kaj la Jaraj kunvenoj, okazantaj kutime dum la Zamenhofaj Festoj. En junio 2003 okazis Renkontiĝo kaj Jara Kunveno en SALVAGNAC (81), kiu kunigis tamen malmultajn membrojn (sep).

Estas bedaŭrinde mencii, ke ĉi jare la federaciaj ekspoziciaj paneloj estis uzitaj nur unufoje, en Tuluzo. Ni memorigas, ke tiuj 12 paneloj povas esti senpage pruntitaj de la membro-grupoj, kontraŭ nur la sendo-kosto.

*Eksteraj rilatoj:*

De oktobro 2002 ĝis marto 2003 nia asocio partoprenis la kampanjon iniciatitan de UFE ĉe la novelektitaj deputitoj, por la allaso de esperanto ĉe la oficialaj ekzamenoj. Estis senditaj interretaj mesaĝoj al 26 deputitoj. 7 el ili poste skribis al la ministro pri juneco, unu al la la ministro pri eŭropaj aferoj kaj unu trasendis al lia parlamenta grupo. Du konsentis rendevuon en marto 2003.

*Konkludo:*
Multo restas farenda en nia regiono, aparte en la departementoj 32, 46 kaj 82, kiuj apenaŭ aŭ tute ne aperas en ĉi raporto.

**3.13 Esperanto-Bretonio** (raportas *Josette Ducloyer*)

*Nombro da membroj 2003: 314*
*Nombro da partoprenantoj en esperantaj kursoj: 160*
*Nombro da lokaj grupoj: 18, en la urboj:*

- Côtes d'Armor : St Brieuc, Plouézec, St Quay-Perros, Lannion, Plestin-les-Grèves, Yffiniac, Guingamp, Loudéac
- Finistère : Quimper, Daoulas, Brest, Morlaix
- Ille-et-Vilaine : Rennes, St Malo
- Morbihan : Vannes, Sarzeau, Hennebont, Pontivy

*Konstantaj agoj de la Federacio*

- Eldono de la Bulteno (3 jare)
- Organizado de rondvojaĝoj de esperantistaj eksterlandanoj en bretonaj urboj (en oktobro 2002 Sabine kaj Henning Hauge-Daberlay pri Norda Frisio, en marto 2003 gesinjoroj Polak pri Ĉeĥio)
- Koruso Esperanto-Bretagne MEVEN : kantoprovoj en St Brieuc, Nantes, Pontivy. La 17an de aŭgusto, partopreno en la festivalo de maristaj kantoj de Paimpol, kun granda sukceso kaj unua kolora paĝo de la ĵurnalo Le Télégramme Administrado de la TTT-ejo
- Organizado de la ĝenerala asembleo
- Pruntedono de ekspozicioj

*Specifaj agoj de la Federacio*

- Oktobro: organizado de koncertoj en Bretonio de koruso de ĉeĥaj infanoj "Jorabinka" de Opava en bretonaj urboj, dank'al Franjo Provost kaj ĉeĥa esperantisto, kiu akompanis la grupon.
- Junio: Forumo pri lingvoj en Brest: vasta budo tre vizitita.
- Akceptado dum tri monatoj (majo-junio-julio) de juna ĉinino (15jara): unu monato kaj duono en liceo (akceptado en unu familio en Rennes) kaj unu monato kaj duono en diversaj familioj tra Bretonio.

*Agoj de la lokaj asocioj*

- internacia staĝo en Plouézec, organizita de Esperanto-22: de la 16a al 23a de aŭgusto partoprenis 150 personoj el 10 landoj, kun diversaj kursoj kaj aktivaĵoj en la lingvo esperanto: pedagogio, verkado, jogo, teatro, informadiko (2 niveloj), kanto en koruso, turismo, bretonaj dancoj, diversaj prelegoj, kaj eĉ ĉi-jare fanfaro! Grandega sukceso, kun multaj artikoloj en la ĵurnaloj Ouest-France kaj Le Télégramme, kaj precipe televidelsendo, kiu aperis dufoje en la tuta okcidenta parto de Francio, post intervjuo da 4 horoj
- Ĉiun semajnon okazas kursoj en 18 bretonaj urbetoj, kaj konversaciaj rondoj en diversaj lokoj, kiel kafejoj en Daoulas, Vannes kaj St Brieuc
- En St Brieuc, sukceso de la ekspresaj kursoj en 6 semajnoj
- Kursoj en liceoj en St Brieuc kaj Morlaix, en mezlernejo en Lannion
- Monataj elsendoj en Radio-Clarté en st Brieuc de Sébastien Erhard, la junulo dungita de Esperanto-22
- Prelegoj pri esperanto en pluraj libertempaj universitatoj (UTL) kaj pri diversaj temoj (en Rennes: Esperanto por komuniki, Rachel kaj David pri ilia vojaĝo tra la mondo, en multaj urbetoj prelegoj de Zef pri sia vojaĝo per biciklo tra Azio), Partopreno en forumoj pri asocioj kaj al publikaj festoj, kiel en Vannes "festo sen limo"
- en Hennebont: donacoj de libroj al bibliotekoj, intervjuo en la bretona radio Bro-Gwened, rilatoj kun ĝemelaj grupoj, realigo de libreto pri la unua esperantisto de Hennebont, Jean Mariette, kies titolo estas, "Jean Mariette, nia esperantista avo"
- korespondado kun eksterlandaj grupoj (ekzemple la grupo de Quimper korespondas kun grupo en Aŭstralio)
- En Pontivy, akceptado de Ĉina profesoro pri la franca kaj pri Esperanto en la Universitato de Ŝandong, por prepari internacian kolokvon pri Emile Masson, verkisto kaj esperantisto, kiu naskiĝis en tiu urbeto.

## 4. Fakaj Asocioj

**4.1 JEFO-Espéranto-Jeunes**
Ne alvenis raporto.

**4.2 GEE**
Ne alvenis raporto.

**4.3 FKEA (Franca Katolika Esperanto-Asocio)**
Ne alvenis raporto.

**4.4 Federacio Esperantista de Laboro (FET)**
(raportas *Vincent Charlot*)

Pro malsanoj de niaj Prezidanto kaj Sekretario, ni devis nuligi nian ĝeneralan kunvenon kadre de la interasocia kongreso en Grezijono en Majo 2003. Nia komitato do ne ŝanĝigis kaj konsistas el Thierry Bénéfice, Charles Billard, Maurice Burtet, Vincent Charlot, Renée Davrainville, Jean-Pierre Esquillan, Denis Gauci, Bernard Greck, Joëlle Huet, Pierre Jouvin, Robert Laudereau, Pierre Lévy, Jérôme Mathieu, Gérard Réquigny.

Jen funkcioj en nia komitato: Vincent Charlot Sekretario, reprezentas FET ĉe UFE, Renée Davrainville Kasistino, Denis Gauci: Libroservo, Robert Laudereau: Prezidanto, Pierre Levy: korektanto de TE, Jérôme Mathieu reprezentas UFE ĉe FET, Gérard Réquigny Redaktoro de Travailleur Espérantiste.

Frédéric Scibor kreis la TTT-ejon de FET kaj zorgas kun Vincent Charlot pri ĝi ĉe http://www.fetesperanto.lautre.net/

Nia komitato kunvenis 4-foje 250803, 141003, 080104 kaj 140204. Nia membraro estas 85 kaj TE havas 100 abonantojn.

*Niaj agadoj:*
Festo de Humanité

Iom pozitiva saldo por FET kaj profitoj de UFE kaj JEFO. Bona partopreno de JEFO, UFE kaj de multaj Esperantistoj. Pli ol cent adresoj kolektitaj.

Preparo de ESF
FET decidis partopreni ESF-2003 kaj estis taskita de UFE reprezenti ĝin en ESF 2003.

*Estontaj taskoj, ĝis nia ĝenerala kunveno*
Partopreno en preparado de Interasocia Kongreso 2005 en Bulonjo. Manifestacio de la 9-a de Majo 2004 (Eŭropa Bunto). Partopreno en kampanjo de UFE al politikistoj. Nia ĝenerala kunveno okazos dum interasocia kongreso en la Roque d'Antheron.

## 5. Konkludo

La Prezidanto dankas al ĉiuj siaj gekolegoj de la estraro kaj de la komitato, al ĉiuj asocioj kontrakte kunligitaj al Esperanto-France, al la komisionoj kaj al ĉiuj membroj de UFE, pro la laboro kune farita al la celoj redifinitaj en 2002 en Strasburgo.
Estas konstateblaj kaj kontentigaj pliintensigo de interŝanĝoj de informoj kaj de proponoj kun la tuta membraro kaj kun la asocioj, plihomogenigo de agadoj kaj de kampanjoj, pliintimigo de rilatoj kun SAT-amikaro.
Ŝajnas kelkfoje malfekundaj kaj neutilaj niaj agadoj al la ekstero, al la politikaj aŭ ŝtataj medioj. Tamen estas ankaŭ konstateble, ke nia movado kaj nia agado estas pli ofte menciitaj kaj serioze konsiderataj en medioj malpli kaj mlpli primokaj aŭ skeptikaj. Ni daŭrigu nian semadon, eĉ se cent semoj perdiĝos, eĉ se mil semoj perdiĝos.

**Claude Longue-Epée**

## Komentoj pri la bilanco de la jaro 2002-2003

(raportas *Jean-Louis Texier*)

La fluo de aĉetoj kaj vendoj paralelas antaŭajn jarojn sen plialtigo de la stokoj. Tiuj-ĉi ankaŭ ne estas pliampleksigitaj far disdonotaj aŭ disvendotaj informiloj. Ties plej granda provizo fontis ĉi-periode el disdono da Premiers Rendez-vous far firmao Assimil. Tiun ni denove ege danku pro tiu diskoniga helpo.

La daŭre dissendata katalogo kaj al la anoj kun la aŭtuna numero de la revuo, kaj kun ĉiu unuopa fakturo ebligas al la libroservo regulan funkciadon. Bedaŭrinde malgraŭ ĉiu monata instigo al la legantaro ne grandiĝas la kulturemo ĉe la unuopaj esperantistoj, pro certe mankanta intereso al tio de la diversaj asociaj strukturoj, renkontaj programoj, lokaj bultenoj.

Kotizaj enspezoj kontribuas en nia asocio al ĉiuj servoj ŝuldataj al la anaro, de la livero de moderna luksa revuo sesfoje jare, de ĉiumonata bulteno pri la vivo 150 ekzistantaj kluboj kaj kursoj, ĝis la minimuma administra laboro de bonvolemuloj ĉe la sidejo por mendoj, aĉetoj, enkasigoj, ekspedoj, abonservoj, kunvenpreparoj... sen forgesi la devigajn kostojn kiel labormaterialon, asekuron, energion, impostojn, ŝarĝojn, komunikilojn, materialan renovigon... kaj laŭstatutan repagon de transportoj al la komitatanoj. Al tio aldoniĝis en pli granda parto de la lasta jaro parta salajro al du dungitoj.

Denove helpis la karavano al la U.K. kies maklero partoprenis proporcie en diversaj kostofakoj. Donacoj venas al la asocio el diversaj horizontoj, aldonitis ĉi-jare 2000 eŭroj sekve al la kampanjo en ĵurnalo LE MONDE, 700 eŭroj al multaj donacetoj sed ni ne povis zorgi pri la dua ondo al la "Défense des Droits Linguistiques" kiu mem repagis antaŭan jaron siajn investojn per alporto de 5500 eŭroj.

Klubanoj 2000 estis plu fidelaj, kio ebligas certigi al la asocio rezerveton (dank' al la pozitiva saldo de la antaŭaj jaroj) egalan al duono de unu jarkotizaro (bona bazo estus dujara ekvivalento). Servo provizi bonan materialon al niaj instrukapablaj gesamideanoj restas unu el niaj prioritatoj, unu triono el niaj vendoj koncernas tiun nemalhaveblan rolon.

Buĝeto 2004. La buĝeto adoptita de la jarkunveno en Baugé ĉi-somere grandlinie rigardas la jaron 2003-2004 sen troa negativo. Sed restas pendanta la salajra kaj socia kosto de nova dungitino, ne antaŭvidita en Baugé. Komitata plimulto antaŭvidis en siaj preparinterŝanĝoj kompenson de tiuj plusoj per plusaj vendoj, kotizoj kaj subvencioj.

*La kasisto.*

| E S P E R A N T O - F R A N C E | | | |
|---|---|---|---|
| 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS | | | |
| | | | Bil3vol2003e |
| *Les comptes sont en euros* | | | |
| *N.B. Nia bilanco estas en la franca lingvo* | | | |
| *pro bezonata prezento en tiu lingvo* | | | |
| *al diversaj oficialaj instancoj.* | | | |
| *Les comptes sont en euros et répondent* | | | |
| *au journal et aux livres de l'association* | | | |
| *BILAN 2002-2003* | | *actif* | *passif* |
| *Apport Local 1* | | | *15096,38* |
| *Apport Local 2* | | | *11437,64* |
| *Réserve promotions* | | | *8650,03* |
| *Réserve extension siège* | | | *5335,72* |
| *Membres à vie* | | | *17444,45* |
| *Club du Centenaire* | | | *22180,00* |
| *report à nouveau* | | | *96982,78* |
| ***Section 1*** | | | ***177127,80*** |
| *Terrain et plus value* | | *3048,98* | |
| *Partie construite* | | *26754,80* | |
| *amortissement* | | | *8980,40* |
| *Mobilier acheté 92-2003* | | *1152,80* | |
| *amortissement* | | | *1152,80* |
| *Matériel acheté 92-2003* | | *28181,43* | |
| *amortissement* | | | *25722,37* |
| *Installations 91-2002* | | *28592,75* | |
| *amortissement* | | | *19997,62* |
| *Actions (M.C.E.)* | | *45,73* | |
| ***Section 2*** | | ***87776,49*** | ***55853,19*** |
| *Stocks 2003.10.01* | | *71396,00* | |
| ***Section 3*** | | ***71396,00*** | |
| *Opér. Compt anticipées* | | | *27752,55* |
| ***Section 4*** | | | ***27752,55*** |
| *Valeurs titres* | | *12626,06* | |
| *Caisse d'Epargne* | | *38265,26* | |
| *Banque CIC* | | *3088,80* | |
| *C C P* | | *47057,88* | |
| *Caisse siège* | | *908,59* | |
| ***Section 5*** | | ***101946,59*** | |
| ***Différence :*** | ***385,54*** | | |
| *TOTAL* | | *289361,43* | *288975,89* |

| D E P E N S E S | *Réal. 03* | *Bud. 04* | R E C E T T E S | *Réal. 03* |
|---|---|---|---|---|
| **Service de librairie** | | | **Service de librairie** | |
| Etat du stock | 73163 | | Etat du stock | 71396 |
| Achats de livres | 27345 | 21000 | Ventes de livres et divers | 37691 |
| Ports payés | 4429 | 3500 | Ports facturés | 2411 |
| ***Total*** | ***104937*** | ***24500*** | ***Total*** | ***111498*** |
| **Cotisations, bulletin et revue** | | | **Cotisations,revue et bulletin** | |
| Reversements JEFO/GEE/régions | 5674 | 4700 | Membres actifs, et autres | 35776 |
| Cotisations E E U | 840 | 1000 | Membres sympathisants | |
| Membres affiliés U E A | 564 | 600 | Cotisation UEA (différences) | 1772 |
| Impression Bulletin Okazas | 3640 | 3600 | Abonnements LME seul | 2727 |
| Envoi Bulletin Okazas | 1976 | 2000 | Remises abonnements non UEA | 1455 |
| Rédaction Revue LME | | 2000 | ***Total*** | ***41730*** |
| Impression Revue LME | 5160 | 5900 | **Dons** | |
| Port Revue LME | 1030 | 4100 | Klubo 2000 (enmetita rezerven) | "4208" |
| **Total** | **18884** | **23900** | D.D.L. | 668 |
| **Info. & Relations extérieures** | | | Dons divers | 3864 |
| Brochures et prospectus | 1275 | 1000 | ***Total*** | ***4532*** |
| Salons, expositions | 1965 | 2500 | | |
| Campagne LME(9/2003) | 7017 | 8500 | **Info. & Relations extérieures** | |
| Autres frais(DocsPromoVeko) | 1030 | 1200 | Augmentation stock prospectus | |
| Frais campagnes Dons | 31 | 4000 | Ventes de prospectus | 2865 |
| Lettre de l'espéranto | 225 | 200 | Opération Article Le Monde | 1972 |
| Frais de représentation extérieurs | 454 | 500 | ***Total*** | ***4837*** |
| Autres frais d'information siège | | 1000 | | |
| ***Total*** | ***11997*** | ***18900*** | **Enseign.,formations,services** | |
| **Enseign.,formations, services** | | | Cours et stages(directs/indirects) | 598 |
| Informa.CoursStages | 312 | | Subventions formations Colloques | |
| Frais pédagogiques Fédés | 316 | | Ventes de formations extérieures | |
| Séminaires actifs(colloques) | 440 | 910 | Autres services (traductions, etc...) | |
| ***Total*** | ***1068*** | ***910*** | ***Total*** | ***598*** |
| **Congrès et animation** | | | **Congrès et animation** | |
| Congrès annuel France | 5297 | | Congrès annuel France | 6576 |
| Culture | | 500 | Congrès internationaux | 1926 |
| Accueils,pourboires etc. | 460 | | Voyage groupé UK | 5143 |
| ***Total*** | ***5757*** | ***500*** | ***Total*** | ***13645*** |
| **Frais de fonctionnement** | | | | |
| Siège - Amortissements | 3356 | 3100 | | |
| Siège - Charges propriétaire | 4745 | 2000 | | |
| Siège - Assurances | 2062 | 2000 | | |
| Siège - Impôts(Télé) | 1152 | 1500 | | |
| Energie, entretien | 1215 | 1500 | | |
| Internet et téléphone | 2601 | 2250 | | |
| Fournitures de bureau | 2640 | 1000 | | |
| Petits travaux immob. | 237 | 2000 | | |
| Matériels/Meubles/Renvl divers | | 4000 | | |
| Autres frais de secrétariat | 675 | 250 | | |
| ***Total*** | ***18683*** | ***19600*** | | |
| **Salaires et indemnités** | | | **Salaires et indemnités** | |
| Salaires et indemnités | 18461 | | Aides de l'état | 18279 |
| Charges employeurs | 10708 | | Autres subventions | 722 |
| Autres charges liées aux salariés | 105 | | | |
| Compensations bénévoles | 8176 | 6000 | ***Total*** | ***19001*** |
| ***Total*** | ***37450*** | ***6000*** | **Produits financiers** | |
| **Pertes financières** | | | Produits sur exercice antérieur. | 2510 |
| Frais bancaires | 278 | 250 | Intérêts bancaires | 1088 |
| ***Total*** | ***278*** | ***250*** | ***Total*** | ***3598*** |
| **Différence positive: 385 euros** | | | | |
| TOTAL | 199054 | 94560 | TOTAL | 199439 |